

**2024.12.17 Francio**

Karaj,

Mi estas franca esperantistino, aktiva en la Paca Movado de mia region (Bretonio, Finisterio). Mi ankaŭ estas la kunulino de Vinko kiu transdonis al mi viajn retadresojn.

Pro tio ke la japana asocio, Nihon Hidankyo, ricevis la Pacan Nobel-premion, delegitoj de tiu asocio estos akceptitaj de la Franca Paca Movado de la 22a ĝis la 27a de januaro. Ili ankaŭ ĉeestos en Finisterio (nia departemento) la 26an de januaro. Tiam ni kune manifestacios fronte al la insulo "L'île Longue", posedaĵo de la armeo. Tie, la Franca Ŝtato kaŝas parton de la submarŝipoj ekipitaj de atombomboj....

Kompreneble ni ne povos proksimigi la insulon sed ĉeestos fronte al ĝi.

Ĉu vi, kiel japanaj pacaktivuloj, pretus sendi salutmesaĝon kiun mi prezentus dum la ceremonio antaŭ la manifestacio ?

Mi antaŭdankas vin.

Mi ricevis de la Paca Movado la liston de la partoprenantoj el Japanio :

- S-ro Shigemitsu Tanaka, Japana Konfederacio de Organizoj de Viktimoj de Bomboj A kaj H, transvivinto de la bombado en Nagasaki, vicprezidanto de Hidankyo, Paca Nobelpremiito 2024
- S-ro Toshiaki Ishikawa, vicprezidanto de la nacia sindikato Zenroren, partnero de la franca sindikato CGT
- Sino Yayoi Tsuchida, helpistino de la Ĝenerala Sekretario de Gensuikyo
- Sino Masako Watanabe, Ĝenerala sekretario de Akita (Gensuikyo)
- Sino Mitsuko Imai, Ĝenerala Sekretario de Nara Gensuikyo.
- S-ro Ichi Tanaka, Ĝenerala Sekretario de la japana packomitato de la prefektejo Hyogo

Somere, inter la 6a kaj la 9a de aŭgusto, alia manifestacio okazos en Finisterio, sur nia monteto Menez Hom (330 m, tamen !) por omaĝi la Hibakusha. Mi ankaŭ ŝatus prezenti la esperantistan movadon kaj substreki la ligon inter Paco kaj Esperanto. Ĉu vi ankaŭ pretus helpi min en tiu projekto ?

Mi sincere dankas vin pro via atento.

Plej amike kaj pace. Claudine Guéguen (prononci Klodin')

## 2024. 12. 17 フランス

私はフランスのエスペランチストで、私の地域（ブルターニュ、フィニステール）で平和運動に積極的に取り組んでいます。私もあなたのメールアドレスを教えてくれた Vinko の友人です。

日本の被団協がノーベル平和賞を受賞したため、同協会の代表団は1月22日から27日までフランス平和運動のホストファミリーに迎えられました。彼らは1月26日にもフィニステール（私たちの県）に来る予定です。それから私たちは軍の所有地である「ロング島」の前で一緒にデモをします。そこでフランス政府は核兵器を搭載した潜水艦の一部を隠しています... もちろん島に近づくことはできませんが、島の前に立ちます。日本の平和活動家として、デモ前の式典中に私が送る挨拶のメッセージを送っていただけませんか？ よろしくお願ひします。

平和運動から日本からの参加者リストを受け取りました。

- 田中重光氏、日本原水爆被害者団体協議会、長崎被爆者、日本被団協副会長、2024年ノーベル平和賞受賞者

- 全国労働組合全労連副委員長、フランス労働組合 CGT パートナーの石川俊明氏
- 土田 志乃弥生、原水協事務局長補佐
- 秋田県原水協事務局長 渡辺 真佐子
- 奈良原水協事務局長 今井 光子氏
- 兵庫県日本平和委員会事務局長 田中一氏

8月6日から9日にかけて、フィニステールのメネズ・オム丘（標高330メートル）で、被爆者に敬意を表す別のデモが行われます。また、エスペラント運動を紹介し、平和とエスペラントのつながりを強調したいと思います。あなたもこのプロジェクトに協力していただけますか？

クロディーヌ・ゲギュン（発音はクロディン）



## **Temo: KIAL LA EKSEDZIĜO PRI AFRIKAJ PAROJ ESTAS INTENSA EN AFRIKA SOCIO**

### **0. Enkonduko**

Eksedziĝo estas fenomeno kiu, kvankam disvastigita tra la mondo, prezentas konsiderindajn apartaĵojn en la afrika kunteksto. En Afriko, la kialoj de eksedziĝo ofte estas multoblaj kaj influitaj per kulturaj, sociaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj. Ĉi tiu intenseco en eksedziĝoj en afrikaj socioj meritas profundan analizon, ĉar ĝi influas ne nur la familian strukturon, sed ankaŭ la socian kaj ekonomian stabilecon de individuoj kaj komunumoj.

### **I. LA SOCIOKULTURAJ KAŬZOJ DE EKSEDZIĜO EN AFRIKA SOCIO**

#### **I.1. La evoluo de tradiciaj valoroj**

Historie, Afrikaj socioj havas fortajn komunumajn valorojn, kiuj favoras la grandan familion. Tamen, ĉi tiuj valoroj iom post iom estas pridubitaj de moderneco kaj tutmondiĝo.

La tradicia rolo de virinoj hejme (ofte kiel patrino kaj obeema edzino) venas en konflikton kun la aspiro al individua aŭtonomio, precipe en grandaj grandurboj kie aliro al edukado kaj al la laboro estas pli facila.

## **I.2. Malsamaj atendoj inter geedzoj**

La geedziĝo en Afriko ofte estas rigardata kiel sankta kaj daŭra institucio, sed la atendoj de partneroj povas diverĝi. La socia premo sur virinoj por esti la « ideala patrino » kaj la « perfekta virino » en kunteksto de patriarkeco povas konduki al streĉitecoj, precipe kiam ili iĝas emancipitaj.

Krome, viraj atendoj de virinoj laŭ fideleco, hejmaj roloj kaj generado estas foje malfacile renkonteblaj.

## **I.3. Kulturaj diferencoj inter generacioj**

Junaj generacioj, influitaj de modernaj kaj foje individuismaj ideoj, povas konflikti kun la tradiciaj valoroj de antaŭaj generacioj. Ĉi tio povas konduki al eksedziĝo kiam familiaj atendoj estas konsiderataj malnoviĝintaj.

# **II. EKONOMIA KAJ POLITIKA FACTOROJ INFLUANTAJ EKSEDZIĜOJ**

## **II.1. Ekonomia malfortikeco kaj financaj streĉitecoj**

Malfortikaj ekonomiaj kondiĉoj en Afriko, markitaj de senlaboreco, malriĉeco kaj seksa malegaleco en la labormondo, kreas financon streson, kiu povas pliseverigi streĉiĝojn ene de paroj.

Virinoj, precipe en kamparaj lokoj, ofte havas malmulte da financa aŭtonomio, kio igas ilin vundeblaj al situacioj de hejma perforto aŭ edzeca malekvilibro.

## **II.2. Migrado kaj la rolo de la kampara elirado**

Kampara elirado kaj rapida urbigo kreas geografian apartigon de familianoj, ofte kondukante al eksgeedziĝo. Migrado al urboj aŭ eksterlande foje devigas parojn alfronti defiojn en komunikado, adaptiĝo al novaj medioj kaj administrado de atendoj.

## **II.3. La influo de publikaj politikoj**

En certaj afrikaj landoj, leĝdonaj reformoj pri eksgeedziĝo, la rajtoj de virinoj, kaj la rekono de hejma perforto povas havi signifan efikon al la pliiĝo de eksedziĝoj. Pli granda jura kaj ekonomia aŭtonomio por virinoj favoras la aperon de geedzaj konfliktoj.

# **III. LA ROLO DE RELIGIAJ KAJ FAMILIAJ NORMOJ EN EKSEDZIĜO**

## **III.1. La efiko de religiaj kredoj**

En multaj afrikaj socioj, religioj, ĉefe islamo kaj kristanismo, havas grandan influon sur la percepto de geedziĝo kaj eksedziĝo. Kvankam kelkaj religioj toleras eksedziĝon sub certaj kondiĉoj, religia kaj socia etiketo ofte trudas premon por konservi geedziĝon, eĉ en malfacilaj situacioj.

Eksgeedziĝo foje estas vidita kiel socia kaj religia fiasko, kiu pliiĝas la stigmatigon de

divorcitaj homoj, precipe inter virinoj.

### **III.2. La loko de la granda familio en la eksedziĝa decido**

En certaj afrikaj kulturoj, la grandfamilio (onkloj, onkloinoj, geavoj) ludas decidan rolon en administrado de geedzaj konfliktoj. Tamen, ĝi ankaŭ povas fari la eksedziĝoprocezon pli kompleksa, ĉar ĝi ofte implikas plurajn familianojn, kiuj povas pliigi streĉitecojn.

## **IV. LA SOCIAJ KAJ PSIKOLOGIAJ KONSEKVOJ DE EKSEDZIĜO EN AFRIKA SOCIO**

### **IV.1. Efikoj sur infanoj**

Infanoj ofte estas la unuaj viktimoj de eksedziĝo. En Afriko, kie la grandfamiliaj kaj komunumaj ligoj estas esencaj, eksedziĝo povas konduki al socia izolado de la infano, precipe se la familio de unu el la gepatroj rifuzas zorgi pri la nova familia modelo. La psikologiaj konsekvoj sur infanoj povas esti seriozaj, iras de emociaj malordoj ĝis malfacilaĵoj integriĝantaj en socion.

### **IV.2. La socia stigmatigo de eksedzuloj**

En multaj afrikaj socioj, eksedziĝo daŭre estas vidita kiel fiasko, precipe por virinoj. Ĉi tio povas konduki al forta stigmato, socia izolado kaj eĉ premo rapide reedziĝi, ofte en kondiĉoj kiuj ne garantias pli bonan estontecon.

### **IV.3. La efiko al virinoj kaj ilia sendependeco**

Eksedziĝo povas marki gravan turnopunkton por virinoj, kiuj, en certaj kuntekstoj, povas reakiri pli grandan liberecon kaj sendependecon. Tamen, en kunteksto de forta ekonomia kaj socia dependeco, divorcitaj virinoj povas esti elmetitaj al malfortikaj kondiĉoj, kaj foje, ili estas kondamnitaj suferi hejman perforton aŭ socian diskriminacion.

## **KONKLUDO**

Eksedziĝo en afrika socio estas kompleksa fenomeno, kiu rezultas el kombinaĵo de sociaj, kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj. Streĉitecoj ligitaj al ŝanĝado de tradiciaj familiaj roloj, ekonomiaj defioj kaj kulturaj diferencoj inter generacioj kontribuas al la intenseco de eksgeedziĝo inter afrikaj paroj.

Krome, religiaj normoj kaj komunumaj valoroj forte influas la percepton de eksedziĝo, kreante pliajn obstaklojn al ĝia administrado. Tamen, ĉi tiu situacio konstante evoluas, kun rimarkinda efiko al familia strukturo kaj la loko de virinoj en moderna afrika socio. *Honoré Sebuoro (honsebn@gmail.com) el Orienta de DR Kongolando*

## テーマ：アフリカ社会でアフリカ人夫婦の離婚が頻繁な理由

0. はじめに 離婚は、世界中に広く見られる現象ですが、アフリカの状況においては、かなりの特殊性があります。アフリカでは、離婚の理由は多岐にわたることが多く、文化的、社会的、経済的、政治的な要因によって影響を受けます。アフリカ社会における離婚の激しさは、家族構造だけでなく、個人やコミュニティの社会的、経済的安定にも影響を及ぼすため、詳細な分析が必要です。

### I. アフリカ社会における離婚の社会文化的要因

#### 1.1. 伝統的価値観の進化

歴史的に、アフリカ社会には大家族を支持する強い共同体的価値観があります。しかし、これらの価値観は近代化とグローバル化によって徐々に疑問視されつつあります。家庭における女性の伝統的な役割（多くの場合、母親や従順な妻としての役割）は、特に教育や仕事へのアクセスが容易な大都市では、個人の自立への願望と衝突します。

#### 1.2. 夫婦間の異なる期待

アフリカでは結婚は神聖で永続的な制度とみなされることが多いが、パートナーの期待は異なる場合がある。家父長制の文脈において、女性に対して「理想的な母親」や「完璧な女性」であれという社会的圧力がかかっており、特に女性が解放されたときには緊張が生じる可能性がある。さらに、貞操、家庭内の役割、出産に関して男性が女性に期待する内容を満たすことが難しい場合もあります。

#### 1.3. 世代間の文化の違い

若い世代は、現代的で時には個人主義的な考え方に影響を受け、前の世代の伝統的な価値観と衝突することがあります。家族の期待が時代遅れであるとみなされると、離婚につながる可能性があります。

### II. 離婚が及ぼす経済的・政治的要因

#### II.1. 経済の脆弱性と金融の緊張

失業、貧困、労働界における男女不平等に特徴づけられるアフリカの劣悪な経済状況は、カップル間の緊張を悪化させる可能性のある経済的ストレスを生み出している。特に農村部では、女性は経済的自立性がほとんどないことが多く、そのため家庭内暴力や夫婦間の不均衡といった状況に陥りやすい。

#### II.2. 移住と農村からの脱出の役割

農村からの人口流出と急速な都市化により、家族は地理的に離れ離れになり、離婚につながることも少なくなっています。都市や海外に移住すると、カップルはコミュニケーション、新しい環境への適応、期待の管理といった課題に直面することがあります。

II.3. 公共政策の影響 一部のアフリカ諸国では、離婚、女性の権利、家庭内暴力の認識に関する法改正が離婚率の上昇に大きな影響を与える可能性があります。女性の法的および経済的自立が増すと、夫婦間の紛争が発生しやすくなります。

### III. 離婚における宗教と家族の規範の役割

#### III.1. 宗教的信仰の影響

多くのアフリカ社会では、宗教、主にイスラム教とキリスト教が結婚と離婚に対する認識に大きな影響を与えています。一部の宗教では一定の条件下での離婚を容認していますが、宗教的および社会的礼儀作法では困難な状況でも結婚生活を維持するよう圧力をかけることがよくあります。離婚は社会的、宗教的な失敗と見なされる場合があり、特に女性の間では離婚した人に対する偏見が強まります。

### III. 2. 離婚の決定における拡大家族の位置づけ

特定のアフリカ文化では、拡大家族（叔父、叔母、祖父母）が夫婦間の対立を管理する上で重要な役割を果たします。しかし、離婚には複数の家族が関与することが多く、緊張が高まる可能性があるため、離婚手続きがより複雑になる可能性もあります。

## IV. アフリカ社会における離婚の社会的・心理的影響

### IV. 1. 子どもへの影響

離婚の最初の被害者は子供であることが多い。拡大家族や地域社会のつながりが不可欠なアフリカでは、特に片方の親の家族が新しい家族モデルの世話を拒否した場合、離婚は子供の社会的孤立につながる可能性があります。子どもたちに及ぼす心理的影響は、情緒障害から社会への適応の困難に至るまで、深刻なものとなる可能性があります。

### IV. 2. 元配偶者に対する社会的偏見

多くのアフリカ社会では、離婚は今でも、特に女性にとっては失敗と見なされています。これは強い偏見、社会的孤立、さらにはよりよい将来が保証されない状況での早急な再婚への圧力につながる可能性があります。

### IV. 3. 女性とその自立への影響

離婚は女性にとって重要な転換点となる可能性があり、状況によっては、女性はより大きな自由と独立を取り戻すことができます。しかし、経済的、社会的依存が強い状況では、離婚した女性は不安定な状況に陥る可能性があり、時には、家庭内暴力や社会的差別に苦しむ運命にある。

## 結論

アフリカ社会における離婚は、社会的、文化的、経済的、政治的な要因の組み合わせから生じる複雑な現象です。伝統的な家族の役割の変化、経済的な課題、世代間の文化の違いに関連する緊張が、アフリカのカップルの離婚の激化に寄与しています。

さらに、宗教的規範やコミュニティの価値観は離婚に対する認識に強い影響を及ぼし、離婚の管理にさらなる障害を生み出します。しかし、この状況は絶えず変化しており、家族構造や現代のアフリカ社会における女性の地位に顕著な影響を与えています。

コンゴ民主共和国東部出身のオノレ・セブホロ ([honsebn@gmail.com](mailto:honsebn@gmail.com))



## Feliĉa temo

La 17a de decembro estis mia naskiĝtago. Mi fariĝis 83-jara. Mi estas ĝoja, ke mi nun vivas sane kaj tiel longe. Mi ne havas specifajn zorgojn krom demenciĝo de mia edzino, kaj vivas relative feliĉe. Okaze de mia naskiĝtago venis kelkaj gratulmesaĝo. Mi prezentos ilin.

### 嬉しい話題

12月17日は私の誕生日でした。83歳になりました。今は健康で長生きできて嬉しいです。妻の認知症以外には特に心配事はなく、比較的幸せに暮らしています。私の誕生日には、お祝いのメッセージが何通も届きました。紹介させていただきます。

## De itala amiko:

Mia mesaĝo:

Kara Karla, dankon. Mi estas 83-jara, sed lau mia plano mi devas plu vivi 13 jarojn. Mi esperas, ke mi sukcesos kun sana kapo.

Mia amikino, kiu j<sup>^</sup>us revenis de Italio, sendis tiun panon kiel donacon por mia naskiĝtago. Mi aĉetis italan vinon kaj ĝuos ambau. Jasuo



イタリア人の友人より:

私のメッセージ: カーラさん、ありがとう。私は83歳ですが、私の計画によればあと13年生きなければなりません。健康な頭のみでそれに成功することを祈ります。イタリアから帰ってきたばかりの友達が、私の誕生日にこのパンをプレゼントしてくれました。イタリアワインを買ったので、両方楽しめます。ヤスオ

De Carla Zulian

Kara Profesoro Jasuo,  
mi dankas vin por la bela foto !

Vino CORVO estas altkvalita kaj bonega !

Dum la monato de Decembro, en Italio, ni uzas manĝi plurajn doĉaĵojn.



Laù via foto, mi komprenas ke ankaù tiu ĉi pano estas Decembra dolĉaĵo. La nomo, itale, estas PANETTONE, dolĉaĵo farita de bakisto el Milano (itala, norda urbo).

La nomo de la bakisto estis TONI (= Antono). Li nomis la panon laù la dialekto de Milano:

"el pan de Toni" (= la pano de Antono). Poste "el pan de Toni" fariĝis "panettone" !

Ĝi enhavas: buteron, ovojn, tritikfarunon, fermento, sekvinberojn, ŝeleteojn de oranĝoj kanditaj, kaj estas bonega !!!

Aliaj italaj dolĉaĵoj estas: TORRONE (kun mielo, amandoj, juglandoj, aveloj) kaj PANFORTE (kun multaj kanditaj fruktoj).

Hodiaù estas la naskiĝdatreveno ankaù de Papo Francisko, sed li havas 88 jarojn: vi estas pli juna ol li. Mi esperas ke vi fariĝos centjaraĝa kaj kun tre, tre bona sano.

Kore. CARLA.

## イタリアから

美しい写真をありがとうございます！ CORVO のワインは高品質で素晴らしいです！ イタリアでは、12月の間、さまざまなお菓子を食べる習慣があります。写真から、このパンも12月のデザートだということがわかりました。イタリア語では「パネトーネ」と呼ばれ、ミラノ（イタリア北部の都市）のパン職人が作るお菓子です。そのパン職人の名前は TONI（＝アントン）でした。彼はミラノの方言にちなんでパンに名前を付けました。「エル・パン・デ・トニ」（＝アントンのパン）。すると「エル・パン・デ・トニ」は「パネットーネ」になったのです！ バター、卵、小麦粉、イースト、レーズン、砂糖漬けのオレンジの皮が入っていて、最高です!!!

その他のイタリアのお菓子には、TORRONE（蜂蜜、アーモンド、クルミ、ヘーゼルナッツ入り）と PANFORTE（砂糖漬けのフルーツがたっぷり）があります。

今日はフランシスコ教皇の誕生日でもあります。彼は88歳です。あなたは彼よりも若いです。あなたが100歳まで健康で長生きすることを祈っています。親愛なる。カーラ。

## Denove de Italio

Kara Jasuo,

okaze de via persona datreveno mi elkore bondeziras al vi. Restu sana kaj cxiam bonfarta kaj same juna. Dankon por ĉio kion vi faras por la Esperantujo.

La Papo festas kun vi - kiel vi scias, li naskigxis la 17-an de decembro 1936.

En placo de Sankta Petro en Vaticano okazas nuntempe ekspozicio de kripoj el diversaj landoj de la mondo. Mi vidis unu el Japanio ( vidu la foton ).

Havu agrablan festotagon !!!!

Amike, Sunfloro A 19



### また別のイタリア女性から


親愛なるヤスオ様 あなたの個人的な記念日に、心からお祝いを申し上げます。健康でいつも元気で若々しくいてください。エスペラントのために尽力してくださりありがとうございます。教皇の誕生日はあなたと一緒に。教皇は 1936 年 12 月 17 日に生まれました。現在、バチカンのサン・ピエトロ広場で世界各国のキリスト降誕シーンの展示会が開催されています。日本の kripo を一つ見ました(写真参照)。素敵なお休みをお過ごしください！ よろしくお願いたします、ひまわりより

Kara Jasuo,

Kripo signifas CRIB en la angla. Temas pri rememoro de naskigxo de Jesuo Kristo antaux pli ol du mil jaroj.

En katolikaj landoj oni kutime preparas kripon precipe en pregxejoj en monato decembro - okaze de Kristnasko, ankaux hejme.

Ili povas esti grandaj aux etaj, vere diverspecaj. Do en la foto oni vidas apenaux naskigxintan Jesuon Kriston kun Maria kaj Josef.



Mi sendas al vi ankaux foton de granda kripo en placo Sankta Petro en Vaticano.

Kun sinceraj amikaj salutoj, Jitka

親愛なるヤスオ様

crib は英語で CRIB を意味します。それは 2000 年以上前のイエス・キリストの誕生を記念するものです。カトリックの国では、特に 12 月に教会でクリスマスを祝い、また自宅でもキリスト降誕の場面を準備するのが習慣です。大きさも大きさも本当に多様です。写真には、生まれたばかりのイエス・キリストとマリアとヨセフが写っています。バチカンのサン・ピエトロ広場にある大きなキリスト降誕の場面の写真も送ります。心からの挨拶とともに  
ジトカ



## Rusio

Kara Jasuo!



Mi gratulas Vin okaze Via naskiĝtago kaj deziras al Vi fortikan sanon almenaŭ por la proksimaj tridek jaroj kaj la saman entuziasmon kaj energion! Vi multege faris en la kampo de Esperanto, kreis propran projekton de sumoolegato kaj persiste gvidas ĝin kaj tio postulas grandegan kvanton da tempo kaj fortoj! Vi regule sendas interesajn novaĵojn, proprajn artikolojn kaj eĉ pentraĵojn aŭ desegnaĵojn! Vi interesiĝas pri la vivo de la homoj el la diversaj anguloj de la mondo kaj ĉiam reagis al variaj eventoj! Fojfoje al mi ŝajnas, ke tion ĉi faras NE unu homo, sed teamo! Tamen mi scias, ke Vi faras ĉion mem kaj altkvalite! Mi admiras Vin



kaj denove deziras al Vi longvivecon kaj senlaca agadon por Esperanto, per Esperanto kaj helpe de Esperanto!

Amike, Lidija Jerofejeva (Montaro), Niĵnij-Tagilo, Ruslando.

### ロシアから

親愛なるヤスオさん！  
お誕生日おめでとうございます。  
今後少なくとも  
30 年間は健康で、同じ熱  
意とエネルギーを持ち続  
けてくださいますようお  
祈りいたします。

あなたはエスペラント  
の分野で多くのことを成  
し遂げ、独自の「エスペ  
ラント相撲」を立ち上げ  
て粘り強くリードしてき  
ましたが、それには膨大  
な時間と労力が必要で  
す。興味深いニュース、

独自の記事、さらには絵画や絵も定期的に送信します。あなたは世界のさまざまな場所の人々の生活に興味があり、常に変化する出来事に反応します。時々、これは 1 人の人間ではなく、チームによって行われているように私には思えます。しかし、私はあなたがすべてを自分で、そして高い水準で行っていることを知っています！私はあなたを尊敬しており、エスペラント語を通じて、そしてエスペラント語の助けを借りて、エスペラント語のために長く精力的に活動することを改めて祈っています。 敬具、

リディア・イエロフェエワ、ニジニ・タギル、ロシア。

